

COT. — Mi havas motivojn lin kredi al tio kontraŭa, kaj pro tio mia malespero estas senrimeda.

FIL. — Ĉu mi ne estas via kuracisto?

COT. — Estos neutilaj viaj zorgoj.

FIL. — Lasu min agi. Nun mi iras trovi sinjoron Riccardo, kaj mi esperas.....

COT. — Ne sinjoro, haltu.

FIL. — Mi ne volus ke la konsolo vin delirigu. Antaŭ momento vi aspektis al mi tute gaja. De kio naskiĝas nun tia ŝanĝo?

COT. — Mi estas certa ke mi devos havi malbonan ŝancon.

FIL. — Tia malbravaĵo estas malinda je vi, kaj estus malinda je mi.

COT. — Ne risku pligrandigi mian malfeliĉon!

FIL. — Ĉu vi timas ke la patro insistos? Lasu ke mi faru la provon.

COT. — Ne, certe, miaflanke mi malaprobas.

FIL. — Kaj mi, miaflanke, volas ĝin fari.

COT. — Mi foriros el Hago; mi foriros surmomente.

FIL. — Vi ne agos al mi tiel malĝentile.

SCENO NAŬA

(*FRAŬLINO GIANNINA kaj la diritaj*).

GIA. — Kion signifas, miaj sinjoroj, ĉi tiu disputado?

FIL. — Sinjoro de la Coterie agas al mi per sendankemo kiun mi ne meritas.

GIA. — Ĉu eble, ke li estas je tio kapabla?

COT. — Ha! fraŭlino, mi estas kompatinda malfeliĉulo.

FIL. — Mi preskaŭ ekdirus ke li mem ne scias kion li volas. Li konfesas sian pasion, sin rekomendas al mia helpo, kaj, kiam mi min proponas por havigi al li fraŭlinon Costanza, li ekfuriozas kaj minacas foriri.

GIA. — Mi miras ke sinjoro leŭtenanto ankoraŭ parolas pri foriro.

COT. — (*al Giannina, ironie*) Ĉu vi konsilus min resti, dank' al tiel bela espero?

GIA. — Vi devas resti dank'al tiu kiu vin amas. Laŭ permeso de mia patro, aŭdu kion ĵus diris al mi pri vi fraŭlino Costanza.

FIL. — (*al Giannina*) Ĉu ne povas aŭdi mi?

GIA. — (*al Filiberto*) Min kompatu. La amikino min komisiis ĝin diri nur al li.

FIL. — (He, mia filino poste ĉion diros inter ŝi kaj mi.)

GIA. — (*mallaŭte al Coterie*) (Unu mia improviza savilo kredigis al mia patro ke vi estas logita de Costanza. Tia vin ŝajnigu, se vi min amas, kaj ne plu parolu pri foriro.)

COT. — (Ho subtilaĵo de amo!)

FIL. — Nu, ĉu vi persistas en via obstino?

COT. — Ha, ne, sinjoro; mi min rekomendas al via boneco.

FIL. — Ĉu vi volas ke mi parolu al sinjoro Riccardo?

COT. — Faru tion, kio al vi plaĉas.

FIL. — Jam vi ne diras ke vi volas foriri?

COT. — Mi promesas haltadi.

FIL. — (Kiaj miraklegaj vortoj kaŭzis tian ŝanĝon? Mi tre scivolas ilin koni.)

COT. — Pardonu, mi vin humile petas, miajn ekstravagancojn.

FIL. — He, jes, la enamiĝintoj agas eĉ pli malsaĝe. Diru, Giannina, fraŭlino Costanza, ĉu foriris?

GIA. — Ne, sinjoro. Ŝi min atendas en miaj ĉambroj.

FIL. — Sinjoro leŭtenanto, iru havigi al ŝi iom da societo.

COT. — Sed, mi ne volus, sinjoro.....

GIA. — Iru, iru. — Aŭdu (*mallaŭte al Coterie*) (Atendu min en la antaŭĉambro, tuj mi venos.)

COT. — Mi tuj iras, por vin obei (*li eliras*).

SCENO DEKA

(*SINJORO FILIBERTO kaj FRAŬLINO GIANNINA*).

FIL. — (Granda povo de vortoj!) (*al Giannina*) Kaj kion vi diris al li?

GIA. — Ke li iru, ke lia karulino lin atendas.

FIL. — Kaj la unuan fojon?

GIA. — Ke fraŭlino Costanza havas bonajn esperojn, ke ŝia patro konvinkiĝos.

FIL. — Ĉu vi ne povis tion diri laŭte?

GIA. — Kelkfoje la aferoj kiujn oni diras sekrete, faras pli grandan impreson.

FIL. — Vi ne parolas malbone.

GIA. — Laŭ permeso, sinjoro.

FIL. — Kien vi iras ?

GIA. — Kuraĝigi tiun timemulon.

FIL. — Jes, tion faru. Mi lin al vi rekomendas.

GIA. — Ne dubu, li estas bone rekomendita (*ŝi foriras*).

FIL. — Mia filino estas bonkora, kaj mi tia estas kiom ŝi (*li foriras*).

KURTENO



AKTO DUA

SCENO UNUA

Ĉambro de Fraŭlino Giannina.

(FRAŬLINO COSTANZA sidanta).

COS. — Kiu estus iam pensinta ke sinjoro de la Coterie havas al mi iom da inklino? Estas vere ke li uzis afablaĵojn kaj volonte parolis kun mi, sed montrojn de granda amo mi ne povas diri ke de li mi ricevis. Mi ja lin amis ĉiam, kaj mi ne kuraĝis elmontri mian pasion. Do, pro la sama kialo, mi povas min flati ke li ardis kiel mi, kaj estis kiel mi diskreta. Vere, hontema oficiro estas strangaĵo, kaj ankoraŭ mi penas ĝin kredi; tamen, se sinjoro Filiberto ĝin diris, li certe havis siajn bonajn motivojn; mi volas ĝin kredi ĝis mi havos kontraŭajn pruvojn. Jen ĝuste mia ĉarma militisto..... Sed estas kun li fraŭlino Giannina. Ŝi neniam permesis ke ni estu kune unu momenton. Mi suspektas ke eble ŝi estas mia konkurantino.

SCENO DUA

(FRAŬLINO GIANNINA, SINJORO DE LA COTERIE kaj dirita, kiu stariĝas).

GIA. — Bonvolu sidiĝi, fraŭlino. Min pardonu ke mi devis iom lasi vin sola. Mi scias ke vi estas sufiĉe bona por min pardoni, kaj plie mi havas kun mi personon (*montrante al sinjoro de la Coterie*) kiu kapablos havigi al mi vian indulgon.

COS. — En via hejmo vi ne devas havi ĝenon pri vera amikino. Estas al mi kara via kunestado se tio ne estas por vi malhelpo.

GIA. — Ĉu vi aŭdas, sinjoro leŭtenanto?... Ĉu vi opinias ke niaj nederlandaninoj havas spriton?

COT. — Ne de nun mi konvinkiĝis pri tio.

COS. — Sinjoro de la Coterie estas en hejmo kiu honoras nian nacion; kaj, se li amas spritajn virinojn, li ne povas malproksimiĝi de ĉi tie.

GIA. — (*sin klinante*) Tro ĝentila, fraŭlino.

COS. — Mi vin juste juĝas laŭ via merito.

GIA. — Ni ne diskutu pri nia merito. Ni lasu la juĝon pri ĝi al sinjoro leŭtenanto.

COT. — Se vi bezonas juĝon, mi vin konsilas elekti pli valoran juĝanton.

GIA. — Vere, ne povas esti bona juĝanto kiu estas iel influata.

COS. — Kaj, krom la influo, havas dankan devon al sia hejmestrino.

GIA. — (*al Coterie*) Ho! En Francujo la ĉefajn afablaĵojn oni faras al la fremdulinoj. Ĉu ne vere?

COT. — Nederlando ne estas malpli bonmora ol mia lando.

COS. — Tio signifas ke evidentiĝas plie kiu plie meritas.

GIA. — (*al Costanza*) Kaj pro tio li plimulte vin estimas.

COT. — (Ĉi tiu konversacio volas min embarasigi.)

COS. — Laŭ permeso, fraŭlino.

GIA. — Ĉu vi volas foriri tiel frue?

COS. — Mia onklino min atendas. Mi promesis tagmanĝi hodiaŭ kun ŝi, kaj frui ne estas malbone.

GIA. — Ankoraŭ estas frue. Via onklino estas aĝa; eble vi ŝin trovus en lito.

COT. — (*mallaŭte al Giannina*) (Ne malhelpu ke ŝi foriru.)

COS. — (*al Giannina*) Kion diras sinjoro leŭtenanto?

GIA. — Li min instigas por ke mi vin restigu.

COS. — (*sin klinante*) Min konfuzas lia ĝentileco.

COT. — (Ŝi ŝatas min turmenti.)

GIA. — Kion vi diras, amikino, ĉu mi ne estas bonkora?

COS. — Mi povas nur vin laŭdi pro via lojala amikeco.

GIA. — (*al Coterie*) Konfesu ankaŭ vi la ŝuldon kiun vi havas al mi.

COT. — (*ironie*) Ja, certe, mi havas indan motivon vin danki. Vi, konante mian internon, certe nun scias kiom granda estas la konsolo kiun vi min donas.

GIA. — (*al fraŭlino Costanza*) Ĉu vi aŭdas? Li estas tre konsolata...

COS. — Kara amikino, tial ke vi estas al mi tiel afabla, kaj tiom por li interesiĝas, permesu ke mi parolu libere. Via aminda

patro al mi diris aferojn kiuj min plenigis je ĝojo kaj miro. Se estas vera ĉio, kion li min diris, petu vi mem sinjoron de la Coterie ke li bonvolu min certigi pri ĝi.

GIA. — Ĝuste tion mi intencis. Sed la interparolado ne povus esti mallonga. La onklino vin atendas, kaj oni povas ĝin prokrasti al alia renkonto.

COT. — (Volu la ĉielo ke ŝi ne metu min en pli komplikan situacion.)

COS. — Malmultaj vortoj sufiĉas por tio kion mi demandas.

GIA. — Nu, sinjoro leŭtenanto, ĉu vi sentas vin kapabla diri al ŝi ĉion per malmulto?

COT. — Vere, mi ne min sentas kapabla.

GIA. — Ne amikino, ne estas eble limigi en mallongaj esprimoj la senfinajn aĵojn kiujn li devas al vi diri.

COS. — Al mi sufiĉas ke li diru nur unu.

GIA. — Kaj kion vi volus ke li vin diru?

COS. — Ĉu vere li min amas.

GIA. — Kompatu, fraŭlino. Estas tro honesta sinjoro leŭtenanto por paroli pri amo en ĉeesto de knabino (*ŝi montras al si mem*). Mi povas tamen, elirante, faciligi via interparolon, formetante de vi la ĝenon de l' klarigo (*ŝi ekmontras foriron*).

COT. — Haltu, fraŭlino.

COS. — Jes, haltu, kaj ne min humiligu pli daŭre. Estu certa ke neniam mi estus kuraĝinta paroli pri tio, se vi ne estus min instiginta. Mi ne sukcesas kompreni viajn dirojn. Ŝajnas al mi ekvidi en ili malakordon; sed, kiel ajn ĝi estu, mi atendas de l' tempo la veron, kaj nun vi permesu ke mi foriru.

GIA. — Kara amikino, kompatu mian honestan skrupulon. Vi estas libera foriri aŭ resti, kiel al vi plej plaĉas.

SCENO TRIA

(*SINJORO FILIBERTO kaj diritaj*).

FIL. — Tre bela societo! Sed kial stare? Kial vi ne sidas?

GIA. — Costanza ekforiras.

FIL. — (*al Costanza*) Kial tiel frue?

GIA. — Ŝia onklino ŝin atendas.

FIL. — Ne, filino: faru al mi la komplezon resti. Povas esti ke ni vin bezonos; kaj en ĉi tiuj aferoj la momentoj estas tre

FIL. — Estas diabloj, vi virinoj. Sed venos la tempo, filino, kiam vi ankaŭ konos kiom kostas, al geamantoj, ĉi tiuj malgravaj impertinentaĵoj. Vi estas en taŭga aĝo, kaj ĉe la unua bona okazo kiu falos inter miajn manojn, estu preta rezignacii. Kion vi diras, sinjoro de la Coterie, ĉu mi parolas bone?

COT. — Bonege.

GIA. — *(al Coterie)* Sinjor' bonege, ne estas vi kiu devas decidi, estas mi.

FIL. — *(al Giannina)* Kaj ĉu vi ne volas edziniĝi?

GIA. — Se mi povus esperi trovi edzon laŭ mia gusto.

FIL. — Mi deziras ke ni lin trovu laŭ via gusto. Sed antaŭe li devas esti laŭ gusto mia. La doto kiun mi al vi destinas povas igi vin inda je unu el la plej bonaj geedziĝoj el Nederlando.

GIA. — La samon povus diri la patro de fraŭlino Costanza.

FIL. — Ĉu vi volus meti sinjoron Riccardo je mia komparo? Ĉu vi volus vin kompari kun filino de financisto? Vi serioze incitus mian koleron. Mi ne volas plu aŭdi pri tio.

GIA. — Sed mi ne diras...

FIL. — Mi ne volas plu aŭdi pri tio *(li foriras)*.

SCENO KVINA

(FRAŬLINO GIANNINA kaj SINJORO DE LA COTERIE).

COT. — Ha, Giannina mia, ni estas en ĉiam pli malbona situacio. Kiom plibone estus estinte ne sin turni al la rimedo de vi uzita!

GIA. — Kiu estus povinta antaŭvidi ke mia patro volos sin kompromiti tiagrade?

COT. — Mi vidas neniun alian rimedon krom mia subita malproksimiĝo.

GIA. — Tian malbravaĵon mi ne atendis.

COT. — Ĉu mi devas konsenti al edziĝo kun fraŭlino Costanza?

GIA. — Ĝin faru, se vi havas koron ĝin fari.

COT. — Aŭ vi volas ke ni malkaŝu la trompon?

GIA. — Estus malinda ago min elmeti al ruĝiĝo de mensogo malkovrita.

COT. — Sugestu vi ion.

GIA. — Jen tio, kion mi povas diri. Ke vi foriru, ne certe. Ke vi edziĝu kun Costanza, ankaŭ ne. Ke vi malkaŝu la trompon, nepre neniam. Pensu vi kiel savi la amon, la reputacion kaj la konvenon (*ŝi foriras*).

COT. — Bonegaj sugestoj, kiuj malfermas por mi la vojon de liberiĝo. Inter tiom da ne, kia jes restos al mi pripensinda? Ha ĉieloj! Restas al mi nur fatala senesperado (*li foriras*).

SCENO SESA

Alia ĉambro.

(*SINJORO FILIBERTO, poste MARIANNA*).

FIL. — Mi ne opinius ke sinjoro Riccardo rifuzos veni ĉe min. Li scias kiu mi estas, kaj scias ke ne estus lia profito malplaĉi al iu, kiu povas fari al li bonon, kaj povus ankaŭ fari al li malbonon. Li memoros ke mi pruntis al li dek mil florenojn kiam li iĝis financisto. Kvankam tiaj homoj la bonfaraĵojn forgesas facile, kaj kiam ili ne plu bezonas ion, ili rigardas plu al vizaĝo nek parencojn nek amikojn.

MAR. — Sinjoro mastro, se mi ne vin ĝenus, mi volus paroli al vi pri iu afero.

FIL. — Jes, nun mi havas nenion por fari.

MAR. — Mi volus paroli pri afero mia.

FIL. — Sed rapidu, ĉar mi atendas personon.

MAR. — Per du vortoj mi min liberigas. Sinjoro, laŭ via bona permeso, mi volus edziniĝi.

FIL. — Edziniĝu, kaj tio al vi bone profitu.

MAR. — Sed, sinjoro, ĝi ne sufiĉas. Mi estas malriĉa knabino, de dek jaroj mi servas en tiu ĉi hejmo kun amo kaj fideleco konvenaj: mi de vi petas, ne pro devo, sed pro favoro, ian etan monhelpon.

FIL. — Bone, ion mi faros je dankemo de via bona servado. Ĉu vi jam trovis la edzon?

MAR. — Jes, sinjoro.

FIL. — Brave! Mi gratulas. Oni venas min informi kiam ĉio estas aranĝita?

MAR. — Kompatu min, sinjoro. Mi eĉ ne estus tion pensinta por nun, se la hazardo ke mi devis kunloĝi kun junulo dum pluraj monatoj, ne estus doninta al mi la favoran okazon.

FIL. — Kaj jes ja, ke vi enamiĝis je la servisto de la oficiro?

MAR. — Tute ĝuste, sinjoro.

FIL. — Kaj vi ne havas ĝenon sekvi lin tra la mondo?

MAR. — Mi havas esperon ke li restos ĉi tie. Se lia mastro ankaŭ edziĝos, laŭ tio kion oni diras...

FIL. — Jes, verŝajne li edziĝos.

MAR. — Neniu povas ĝin scii plibone ol vi.

FIL. — Mi tre dediĉis min por lia kontentigo.

MAR. — Tial ke vi estas konvinkita, mi vidas jam farita la aferon.

FIL. — Povas esti malhelpoj, sed mi esperas ilin superi.

MAR. — Flanke de la knabino mi ne supozas.

FIL. — Ne, kontraŭe ŝi vere ardas de amo.

MAR. — Certe, tiel al mi ŝajnas.

FIL. — Kaj vi, kiam vi pensas edziniĝi?

MAR. — Se vi estos kontenta, mi edziniĝos kiam edziniĝos la mastrino.

FIL. — Kiu mastrino?

MAR. — Mia mastrino, via filino.

FIL. — Se tiel estas, pasos tempo ankoraŭ.

MAR. — Ĉu vi opinias ke oni devos longe prokrasti ŝian edziniĝon?

FIL. — Tre bele! Ĉu oni devas paroli pri geedziĝo antaŭ ol trovi la edzon?

MAR. — Sed, ĉu ne jam estas la edzo?

FIL. — La edzo? ankaŭ mi devus ja ĝin scii!

MAR. — Ĉu vi ĝin ne scias?

FIL. — Mi kompatinda! Scias nenion, mi. Diru vi kion vi scias, ne kaŝu al mi la veron.

MAR. — Vi min ŝtonigas. Ĉu ŝi ne devas edziniĝi kun sinjoro de la Coterie? Ĉu vi mem ne diris ke vi ĝin scias kaj ke vi estas kontenta?

FIL. — Stulta! Ĉu ŝajnas al vi ke mi volas doni mian filinon al armeano, al kadeto de malriĉa hejmo, al iu, kiu ne havus la rimedon ŝin tenadi laŭ ŝia naskiĝo?

MAR. — Ĉu vi ne min diris, ke sinjoro de la Coterie edziĝas? Kaj ke vi tre klopodis por lin kontentigi?

FIL. — Mi ĝin diris certe.

MAR. — Kaj kiu devos esti lia edzino se ne fraŭlino Giannina?

FIL. — Stulta! Ĉu ne estas en Hago aliaj knabinoj krom ŝi?

MAR. — Li ne vizitadas hejmojn.

FIL. — Kaj ĉu neniu venadas ĉi tien?

MAR. — Mi ne scias ke li atentumas alian fraŭlinon krom la mastrinon.

FIL. — Stulta! Ĉu vi scias nenion pri fraŭlino Costanza?

MAR. — Stultulino povas nenion scii.

FIL. — Kiajn konfidojn faris al vi mia filino?

MAR. — Ŝi ĉiam parolis al mi kun granda estimo pri la ofi-
ciro, kaj ŝi malkaŝis sian kompaton al li.

FIL. — Kaj vi opiniis ke la kompatato devenas de la pasio.

MAR. — Mi jes.

FIL. — Stulta!

MAR. — Kaj mi scias pli multe, ke li volis foriri pro male-
spero.

FIL. — Bone.

MAR. — Timante ke la patro ne konsentos.

FIL. — Tre bone.

MAR. — Kaj ĉu ne estas vi tiu patro?

FIL. — Kaj ĉu ne estas aliaj patroj krom mi?

MAR. — Vi volas min mistifiki.

FIL. — Mi miras pro via obstino.

MAR. — Mi vetus la kapon ke tio kion mi diras estas la vero.

FIL. — Lernu plibone koni kaj respekti vian mastrinon.

MAR. — Finfine, ĝi estas honesta amo...

FIL. — Foriru de ĉi tie.

MAR. — Mi ne vidas en ĝi tiom grandan malbonon.

FIL. — Venas iu; jen sinjoro Riccardo. Foriru de ĉi tie.

MAR. — Per ĝentila maniero, sinjoro.

FIL. — Stulta!

MAR. — Ni vidos kiu estas pli stulta inter mi kaj...

FIL. — Inter vi kaj kiu?

MAR. — Inter mi kaj tiu, kiu ĵus preterpasis la domon (*ŝi foriras*).

SCENO SEPA

(*SINJORO FILIBERTO, poste SINJORO RICCARDO*).

FIL. — Impertinenta! Ĉu ŝi edziniĝos ĉu ne, mi ne plu ŝin volas en mia hejmo. Pensi tiel pri mia filino! Ne kapablas Giannina, ne kapablas.

RIC. — Via servanto, sinjor' Filiberto.

FIL. — Bonan tagon, sinjoro Riccardo. Min pardonu ke mi vin ĝenis.

RIC. — Kion vi al mi ordonas?

FIL. — Mi devas al vi paroli. Bonvolu eksidi.

RIC. — Mi havas malmultan tempon por restadi.

FIL. — Ĉu vi havas multajn aferojn?

RIC. — Jes, certe. Inter aliaj aferoj min sieĝas duona mondo pro kontrabando arestita.

FIL. — Oni min diris pri ĝi. Ĉu tiuj malfeliĉuloj estas ankoraŭ en malliberejo?

RIC. — Ili estas, kaj tie restos ĝis la plena ekstermado de iliaj familioj.

FIL. — Kaj ĉu vi havas koron rezisti la larmojn de iliaj filoj?

RIC. — Ĉu ili ne havis koron uzurpi al ni la rajton de la financoj? Mi volus ke el ĉi tiuj ofte iu falu en la reton. Ĉu vi ne scias ke la kontrabandoj arestitaj pagas al ni la subelspezojn?

FIL. — (Ho, la malbela metio!)

RIC. — Diru al mi kion vi devas diri.

FIL. — Sinjoro Riccardo, vi havas filinon edzinigota?

RIC. — Kiel mi volus ŝin ne havi!

FIL. — Ĉu vin ĝenas ŝin teni en via hejmo?

RIC. — Ne; min ĝenas ke mi devas pensi pri la doto.

FIL. — (Malbona komenco!) Tamen, se ŝi deziras, estos al vi necese ŝin lokigi.

RIC. — Mi ĝin faros, se mi estos devigata ĝin fari; sed sub unu el ĉi tiuj kondiĉoj: sen doto, se ŝi edziniĝos laŭ sia gusto; kun bona doto, se ŝi edziniĝos laŭ gusto mia.

FIL. — Mi havas proponon por vi.

RIC. — Mi ĝin aŭskultos: sed rapidu.

FIL. — Ĉu vi konas la francan oficiron kiu estas gasto en mia hejmo?

RIC. — Ĉu vi lin proponus por mia filino?

FIL. — Se mi lin proponus, ĉu vi trovus en tio malfacilaĵon?

RIC. — Oficiro kaj franca? Nek kun doto, nek sen doto.

FIL. — Ĉu vi malsimpatias la francojn kaj la militistojn?

RIC. — Jes, la unuajn kaj la aliajn egale. Despli malbone se la unua kaj la alia estas la sama persono. Mi malamegas la francojn, ĉar ili ne estas amikoj de la trafikado kaj de la penado kiel ni estas, ili pensas nur pri festenoj, spektakloj, promenadoj. Pri la militistoj plie, mi rajtas esti malkontenta. Mi scias la difekton

kiun kaŭzas la trupoj; ili pretendas ke ni financistoj havas devon nutradi iliajn soldatojn kaj iliajn ĉevalojn, kaj kiam ili estas en kazerno, ili elĉerpus arsenalon da moneroj.

FIL. — La Franco, la oficiro pri kiu mi vin parolas, estas honestulo, ne havas malvirtojn; plie, li estas el nobela sango.

RIC. — Ĉu li estas riĉa?

FIL. — Li estas kadeto de sia familio.

RIC. — Se li ne estas riĉa, mi malmulte estimas lian nobelecon, kaj multe malpli lian metion.

FIL. — Kara amiko, ni parolu inter vi kaj mi, kiam neniu nin aŭskultas. Homo, kia vi, favorita de la sorto, ĉu elspezus malbone kvindek aŭ sepdek mil florenojn por nobele boparenciĝi?

RIC. — Por tia celo mi ne elspezus dek lirojn.

FIL. — Kaj al kiu vi volas doni vian filinon?

RIC. — Se mi devos oferi kelkan sumon, mi volas ŝin meti en unu el la plej bonaj hejmoj el Nederlando.

FIL. — Vi ne sukcesos.

RIC. — Ĉu mi ne sukcesos?

FIL. — Vi ne sukcesos.

RIC. — Kial mi ne sukcesos?

FIL. — Ĉar la bonaj hejmoj el Nederlando ne bezonas riĉiĝi per tia rimedo.

RIC. — Ĉu tiom da fervoro vi havas por tiu geedziĝo?

FIL. — Jes, mi havas por ĝi tre grandan fervoron.

RIC. — Kial vi ne donas al li vian filinon?

FIL. — Tial ke... tial ke ŝin mi ne volas doni al li.

RIC. — Kaj mi ne volas doni al li la mian.

FIL. — Inter vi kaj mi estas diferenco.

RIC. — Mi ne kapablas vidi tiun ĉi diferencon.

FIL. — Oni konas viajn komencojn.

RIC. — Kaj de vi oni ne povas scii la finon.

FIL. — Vi estas tro aroganta.

RIC. — Se mi ne estus en via hejmo, mi parolus pli akre.

FIL. — Mi montros al vi kiu mi estas.

RIC. — Mi ne timhezitas pri vi.

FIL. — Iru, kaj ni interparolos.

RIC. — Jes, ni interparolos. (Li falos iun tagon en miajn manojn. Se mi sukcesos lin trafi en ŝteltrompo pri la plej eta kontrabandaĵo, mi lin volas ruinigi.) (*li foriras*).

SCENO OKA

(*SINJORO FILIBERTO, poste SINJORO DE LA COTERIE*).

FIL. — (*promenante*) Malĝentila, kruda, seneduka, impertinenta!

COT. — (La interdisputoj okazintaj min esperigas ke li ricevis rifuzon.)

FIL. — (Mi ne estos mi, se mi ne lernigos al ci la konduton.)

COT. — (*al Filiberto*) Sinjoro...

FIL. — Bruto, animalaĉo...

COT. — Ĉu al mi venas la komplimento?

FIL. — Pardonu. La kolero min vidotrompas.

COT. — Al kiu vi estas kolera?

FIL. — Al tiu aroganta sinjoro Riccardo.

COT. — Kaj ĉu vere, ke li ne konsentas pri la edziniĝo de sia filino?

FIL. — (Mi bedaŭras ke mi devas kaŭzi al la kompatinda leŭtenanto ĉi tiun novan ĉagrenon.)

COT. — (Estu dankata la ĉielo. La sorto volas min helpi.)

FIL. — Filo mia, ne lasu ke la galo venenu vian sangon.

COT. — Diru al mi la veron: ĉu li rifuzis la proponon?

FIL. — La mondumaj homoj devas esti preparitaj kontraŭ ĉio.

COT. — Mi estas senpacienca koni la veron.

FIL. — (Ho, se mi ĝin diras, li mortas ĉi tie.)

COT. — (Ĉi tiu estas netolerebla ĝenaĵo.)

FIL. — (Tamen necesas ke li ĝin konu.)

COT. — (*ekmontrante foriron*) Sinjoro, laŭ via afabla permeso...

FIL. — Haltu. (Mi ne volus ke li iru sin dronigi pro malespero.)

COT. — Ĉu tiom malfacile estas diri al mi kion li diris al vi?

FIL. — Ne kolero, filo, ne malesperu pro tio, ke patro avida, vanta, seneduka, rifuzas destini konvene la filinon, povas ekzisti rimedo por ŝin havi je lia spito.

COT. — Ne, sinjoro. Kiam la patro ne konsentas, ne estas juste ke mi persistu ŝin voli.

FIL. — Kaj kion vi intencus fari?

COT. — Iri malproksimen de ĉi tie, kaj oferi mian amon al honesteco, al devo, kaj al ĉies kvieto.

FIL. — Kaj vi havus koron forlasi knabinon kiu vin amas? Ŝin lasi viktimo de malespero, por baldaŭ ricevi la malĝojan novaĵon pri ŝia ekmalsano aŭ ŝia morto?

COT. — Ha! Sinjoro Filiberto, vi min mortigas tiel parolante. Se vi konus la pezon de ĉi tiuj viaj vortoj, vi tre zorge evitus ilin prononci.

FIL. — Miaj vortoj celas vian bonon, vian pacon, vian feliĉon.

COT. — Ha! ne; diru prefere mian konfuzon, la pardon de mia vivo.

FIL. — Mi miras ke sprita homo kia vi, estas tiel malkapabla sin hardi.

COT. — Se vi konus mian kazon, vi ne parolus tiele.

FIL. — Mi ĝin konas tre bone, sed mi ne opinias ĝin senepera. La knabino vin amas, vi ŝin amas sincere. Ĉu estus ĉi tiu la unua geedziĝo starigita inter du honestaj gejunuloj sen la patra konsento?

COT. — Ĉu vi aprobus ke mi edzinigu la filinon sen la konsento de la patro?

FIL. — Jes, en la kazo en kiu ni estas, ekzameninte la cirkonstancojn, mi ĝin aprobus. Se la patro estas riĉa, vi estas nobela: vi honoras lian familion per nobeleco, li aranĝas viajn aferojn per la doto.

COT. — Sed! sinjoro, kiel mi povus esperi je doto, ŝin edzinigante laŭ tia maniero? La patro kolera rifuzos doni al ŝi kian ajn helpon.

FIL. — Kiam la afero estos farita, ĝi estos farita. Li havas nur unu filinon. Dum kelkaj tagoj li restos kolera, poste li faros mem kiel faris tiom da aliaj. Li vin akceptos kiel bofilon, kaj eble li vin faros hejma mastro.

COT. — Ĉion jenan mi povus esperi?

FIL. — Jes, sed necesas kuraĝo.

COT. — Kuraĝo ne mankas al mi; la malfacilo estas en la rimedoj.

FIL. — La rimedoj ne estas malfacilaj. Aŭdu kion sugestas al mi la penso. Fraŭlino Costanza verŝajne estas ankoraŭ ĉe sia onklino. Faru kion mi vin diras: foroferu la tagmanĝon hodiaŭ, ankaŭ mi, je via profito, faros la samon. Iru ŝin trovi. Se ŝi vin vere amas, klopodu por ke ŝi ĝin pruvu al vi per faktoj. Se ŝi povas esperi ke la onklino estos favora, ŝi preĝpetu ŝian protekton, kaj se ŝi konsentos, ŝin edzinigu.

COT. — Kaj se la patro, indigninta, minacus mian liberecon?

FIL. — Ŝin konduku en Francujon kun vi.

COT. — Per kiaj rimedoj? Per kia mono?

FIL. — Atendu (*li iras malfermi tirkeston*).

COT. — (Ho ĉieloj! Li ne ekdivenas ke li min kuraĝigas al entrepreno kies domaĝo povus fali sur lin mem.)

FIL. — Prenu; jen al vi cent gineoj en moneroj kaj jen aliaj kvarcent en du bankbiletoj. Kvincent gineoj povos sufiĉi dum kelka tempo. Akceptu ilin de mia amo. Mi mem zorgos por ilin ricevi de la patro de la knabino.

COT. — Sinjoro, mi estas plene konfuzita...

FIL. — Kia konfuzo? Mi miras pri vi. Necesas sprito, necesas kuraĝo. Iru tuj kaj ne perdu la momentojn vane. Mi intertempe iros rigardi la iradon de sinjoro Riccardo, kaj se mi povos ektimi ke li venas vin surprizi, mi trovos personojn kiuj lin detenados. Min avizu pri tio kio okazis, aŭ persone, aŭ per bileto. Kara amiko, min ŝajnas vidi vin jam kontenta. Mi plenĝojas je via flanko. Adiaŭ. La sorto estu al vi favora (*li iras fermi la tirkeston*). (Mi sopiregas la momenton en kiu mi vidos kolerboli, mi vidos malesperi Riccardo.)

COT. — Li donas al mi la konsilon, kaj donas la monon por ĝin plenumi! Kion mi decidas, kion mi pensas? Oniprenu la fortunon ĉe haroj, kaj li nur al si mem plendu, kiu intencante la aliulan ĉagrenon, havigas al si mem la mokridon (*li foriras*).

SCENO NAŬA

(*SINJORO FILIBERTO, sola*).

Vere mi iom min riproĉas interne pro tiaspeca sugesto. Mi pensas ke ankaŭ mi havas filinon, kaj ne volus ke oni faru al mi similan maljustaĵon; kaj instruas la naturo kaj ordonas la leĝo ke al aliaj oni ne havigu kion mem oni ne ŝatus. Sed mi estas puŝata forte de pluraj motivoj. La korsentemo, inklina al gastamo, al amikeco, min alkondukas ami kaj favori la leŭtanton, interesigi por li, kvazaŭ li estus el mia propra sango. La geedziĝo ŝajnas al mi tre konvena, kaj mi opinias nejusta la reziston de sinjoro Riccardo, kaj tiraneca lian severecon kontraŭ la filino. Aldoniĝas al ĉio la malafabla traktado kiun mi suferis, kaj la plezuro vidi humiligita la fierulon. Jes, eĉ se mi devos perdi la kvincent gineojn, mi ĝojos vidi la amikon kontenta, kaj malfierigita Riccardo.

SCENO DEKA

(*FRAŬLINO COSTANZA kaj la dirita*).

COS. — Jen mi je via dispono, sinjoro.

FIL. — (*malkviete*) Kion vi faras ĉi tie?

COS. — Ĉu vi ne min invitis?

FIL. — (*kiel supere*) Ĉu vi vidis sinjoron de la Coterie?

COS. — Mi ne lin vidis.

FIL. — (*kiel supere*) Reiru tuj ĉe vian onklinon.

COS. — Vi min forpelas el via hejmo?

FIL. — Mi ne vin forpelas: mi vin konsilas, mi vin petas. Iru tuj, mi diras.

COS. — Mi volus scii la kialon...

FIL. — Vi ĝin scios, kiam vi estos ĉe via onklino.

COS. — Ĉu estas novaĵoj?

FIL. — Jes, ili estas.

COS. — Diru al mi ilin, do.

FIL. — Ilin diros al vi sinjoro de la Coterie.

COS. — Kie?

FIL. — Ĉe via onklino.

COS. — La leŭtenanto neniam estis tie.

FIL. — Li tien iris antaŭ momento.

COS. — Por kion fari?

FIL. — Reiru tien, vi ĝin scios.

COS. — Ĉu vi parolis kun mia patro?

FIL. — Jes, ĝin demandu al via edzo.

COS. — Al mia edzo?

FIL. — Al via edzo.

COS. — Al sinjoro de la Coterie?

FIL. — Al sinjoro de la Coterie.

COS. — Ĉu mi povas ĝin kredi?

FIL. — Iru tuj ĉe vian onklinon.

COS. — Diru al mi ion, pro kompato.

FIL. — La tempo estas valorega. Se vi perdos tempon, vi perdos la edzon.

COS. — Ho ve! mi kuras tuj. Mi volus havi flugilojn ĉe la plandoj (*ŝi foriras*).

SCENO DEKUNUA

(SINJORO FILIBERTO, poste FRAŬLINO GIANNINA).

FIL. — Pli valoros du vortoj de la leŭtenanto, ol dekmilo da miaj rezonaĵoj.

GIA. — Sinjoro, ĉu estas vera tio, kion diris al mi sinjoro de la Coterie?

FIL. — Kaj kion li vin diris?

GIA. — Ĉu vi lin konsilis edziĝi kun la filino sen la konsento de l' patro?

FIL. — Ĉu li faris al vi la konfidon?

GIA. — Jes, sinjoro.

FIL. — (Ĉi tiu malprudentaĵo min malplaĉas.)

GIA. — Kaj vi donis al li kvincent gineojn, por ke li tion efektivigu?

FIL. — (Nesingarda! Mi preskaŭ pentas ke mi ĝin faris.)

GIA. — Kiu silentas konfirmas: ĉu ĝi estas la vero, do?

FIL. — Kion vi volus diri pri tio?

GIA. — Nenion, sinjoro; sufiĉas ke mi sciis ke tio estas vera. — Humila servantino de sinjor' patro.

FIL. — Kien vi iras?

GIA. — Kunfesti.

FIL. — Pri kio?

GIA. — Pri la edziĝo de sinjoro de la Coterie.

FIL. — Ĝi verŝajne ankoraŭ ne plenumiĝis.

GIA. — Oni esperas ke ĝi baldaŭ okazos.

FIL. — Atentu ne paroli pri tio kun iu ajn.

GIA. — Ne timinde. Oni ĝin konos, kiam ĝi estos farita. Kaj vi havos la meriton tion esti preparinta, kaj mi estos tre kontenta ke ĝi okazis (*ŝi foriras*).

FIL. — Mi ne volus ke ŝi ĉerpu influon de la malbona ekzemplo. — Sed ne ekzistas eĉ dubo pri tio. Ŝi estas bona knabino; ŝi kapablas distingi, kiom mi, la kazojn kaj la konvenojn. Kaj cetere, mi scias kiel mi ŝin edukis, kaj sub mia gardado ne estas danĝero ke okazas similaj katastrofoj (*li foriras*).

KURTENO

AKTO TRIA

SCENO UNUA

Ĉambro de Sinjoro Filiberto.

(SINJORO FILIBERTO kaj MARIANNA).

MAR. — Sinjoro mastro, pardonu, ke mi revenas vin ĝeni.

FIL. — Vi venas diri al mi iun novan azenaĵon.

MAR. — Mi esperus ke vi ne havas plu motivon diri al mi stulta.

FIL. — Sufiĉos ke vi ne revenu por diri al mi stultaĵojn.

MAR. — Mi nenion alian diros, krom ke mi estas en la okazo edziniĝi, kaj mi min rekomendas al via favoremo.

FIL. — Ĉu vi do decidis tion fari antaŭ ol la mastrino?

MAR. — Ne, sinjoro. Se ŝi ĝin faros hodiaŭ, mi faros ĝin morgaŭ.

FIL. — Kaj vi ne volas ke mi diru al vi stulta?

MAR. — Ankoraŭ vi volas ĝin kaŝi al mi?

FIL. — Kion?

MAR. — La edziniĝon de la mastrino.

FIL. — Stultega!

MAR. — Nu, por montri ke mi ne estas stulta, mi min akuzos je kulpeto de scivolemo. Mi restis malantaŭ la pordokurteno por aŭskulti sinjoron de la Coterie parolantan kun mia mastrino, kaj mi aŭdis ke oni decidis plenumi la geedziĝon tre sekrete, kaj ke vi elkasigis kvincent gineojn je konto de doto.

FIL. — *(ridante)* Je konto de doto?

MAR. — Mi supozas je konto de doto. La gineojn mi vidis per jenaj okuloj.

FIL. — Jes, stulta, kaj plie stulta, kaj trioble stulta.

MAR. — (Li min tiel venenas, ke mi lin mortigus per miaj propraj manoj.)

FIL. — (La leŭtenanto tamen kondukis tre malbone. Li ne estus devinta paroli pri tio kun mia filino, kaj multe malpli kun danĝero esti aŭdata.)

MAR. — Se vi volas kaŝi al mi la fakton, timante ke de mi oni ĝin sciis, vi misagas al mia honesteco.

FIL. — Bela honesteco! iri kaŝe aŭskulti aliulajn aferojn, kaj plie miskompreni, kaj fine diri stultaĵojn.

MAR. — Estas vere, ke mi ne estus devinta aŭskulti; sed koncerne la komprenon, mi scias ke mi komprenis la veron.

FIL. — Vi volas tiri el mia buŝo, aŭ el mia mano, ion, kio malplaĉus al vi.

MAR. — Ho, korpo de l' diablo! Kien iris, antaŭ momento, la mastrino?

FIL. — Kien ŝi iris?

MAR. — Ĉu ŝi ne iris kun sinjoro de la Coterie?

FIL. — Kien?

MAR. — Mi aŭdis diri ke ili iros ĉe sinjorinon Geltrude.

FIL. — Ĉe mian fratinnon?

MAR. — Precize.

FIL. — Eble iris tien Giannina, ne la leŭtenanto.

MAR. — Mi scias ke ili foriris kune.

FIL. — La leŭtenanto kredeble ŝin akompanis. Mia fratino loĝas ne malproksime de la loko kien li devis iri. Mia filino ŝatis resti pli proksima, por ekkoni la novaĵojn. Mi scias ĉion, ĉio progresas bone, kaj vi estas stulta.

MAR. — (Mi sentas vere ke la galo min sufokas.)

FIL. — Rigardu kiu estas en la salono. Mi aŭdis iun.

MAR. — (Ho, estus ja bele se la maljunulo restus mokita. Tio ŝajnas al mi ankoraŭ neebla.) (*ŝi foriras*).

SCENO DUA

(*SINJORO FILIBERTO kaj poste GUASCOGNA*).

FIL. — Mi preĝas la ĉielon ke la afero bone finiĝu: ne mankis tamen senprudento flanke de la leŭtenanto por lin mem defaligi. La junularo estas elmetata al tiaj malfortaĵoj. Mi, dank' al ĉielo, estis tre sagaca dum junaĝo, kaj tia estas multe pli en maljuneco.

GUAS. — Servanto de sinjoro Filiberto.

FIL. — Bonan tagon, amiko. Kio nova estas?

GUAS. — Mia mastro prezentas al vi siajn tre humilajn komplimentojn.

FIL. — Kie estas la leŭtenanto? Kion li faras, kion li diras? Kiel statas liaj aferoj?

GUAS. — Mi opinias, ke per ĉi tiu bileto vi estos plene informita.

FIL. — Ni vidu (*li malfermas la bileton*).

GUAS. — (Se li ne diras ke mi foriru, mi volonte restos.)

FIL. — Estas interne karto, kies skribaĵo ŝajnas de mia filino. Ni vidu unue kion diras la amiko.

GUAS. — (Marianna aŭskultas ĉe la pordokurteno. Ŝi ne estas malpli scivolema ol mi.)

FIL. — *Sinjoro. Viaj konsiloj min kuraĝigis al decido kiun mi ne estus aŭdacinta ekfari malgraŭ ĉiuj stimuladoj de mia amo. Jes, certe, li ne havis la kuraĝon. Mi kondukis la filinon en lokon honestan kaj sekuran, tio estas, en hejmon de ŝia patra onklino. Li diras, ke li ŝin kondukis. Kredeble li renkontis survoje fraŭlinon Costanza, kaj akompaniĝis kun ŝi. Bone mi agis, ŝin urĝe sendante. Ĉio verko mia. La larmoj de la knabino kortuŝis la bonan maljunulinon kaj ŝi permesis nian geedziĝon. Bone! Bone! ĝi ne povis okazi pli bone. Oni sendis voki notari-
on kaj en ĉeesto de du atestantoj ni celebris la geedziĝan ceremonion. Tre bone! li lerte kondukis. Mi ne povas tamen al vi esprimi mian konfuzon, kaj ĉar mi ne havas la kuraĝon ree preĝpeti vian favoron, tion faros por ni la skribaĵo de via filino, al kiu vi pardonos eble pli facile, kaj mi kisas viajn manojn. Kion li volas de mi, kion li ne kuraĝas peti, kaj per mia filino li volas atingi? Mi legu la enmetaĵon. Sendube, li tuj iris ĉe mian fratinton por komuniki la fakton al Giannina. Kion diras la filino? Tre kara patro. Ŝi skribas tre bone, ŝi havas belan skribon komercan. Kiom saĝa knabino! La ĉielo ŝin benu. Permesu al mi ke per ĉi tiu karto, mi min ĵetu ĉe viajn piedojn, kaj preĝpetu de vi pardonon. Ho, ĉielo, kion ŝi faris? Certigita de vi mem pri la konsilo de vi donita al sinjoro de la Coterie, kaj pri la mono al li donita por la plenumo, mi cedis al mia pasio, kaj mi edziniĝis kun la leŭtenanto. Ha malinda! Ha mensoganto; perfiduloj, friponoj, ili min murdis!*

SCENO TRIA

(MARIANNA kaj diritaj).

MAR. — Kio okazis, sinjor' mastro ?

FIL. — Min helpu, min subtenu. Ne forlasu min pro kompato.

MAR. — Kion povas fari por vi stultulino ?

FIL. — Vi pravas. Moku, insultu min, min eĉ bastonu. Mi tion meritas kaj donas al vi la permeson tion fari.

MAR. — Ne, male, mi vin kompatas.

FIL. — Mi ne meritas kompaton.

GUAS. — Sinjoro, ne vin fordonu al malespero. Finfine mia mastro estas persono honesta kaj persono nobela.

FIL. — Li ruinigis mian filinon, li disfalogis miajn esperojn.

MAR. — Vi havas rimedon por doni al li situacion.

FIL. — Kaj mi devus do ĵeti la miaĵon laŭ tia maniero ?

GUAS. — Min pardonu, sinjoro, per la sama rezonado per kiu vi volis konvinki sinjoron Riccardo, klopodu konvinki vin mem.

FIL. — *(al Guascogna)* Ha, malbenata ! Vi min riproĉas kun malico.

MAR. — *(al Filiberto kun varmo)* Parolas bone Guascogna, kaj vi ne devas lin riproĉi.

FIL. — Jes, insultu min, malfeliĉa.

MAR. — Mi vin kompatas ĉar la galo vin blindigas.

GUAS. — Riproĉu al vi mem la sekvon de malbona konsilo.

FIL. — Kial min trompi ? Kial kredigi al mi ke la amo de la oficiro celas fraŭlinon Costanza ?

GUAS. — Ĉar Amoro estas sagaca, kaj instruas al geamantoj kaŝi la flamojn kaj prizorgi sian propran feliĉon.

FIL. — Kaj se Riccardo estus konsentinta pri la edziniĝo de sia filino, kian rolon mi estus ludinta en tia intrigo ?

GUAS. — Mia mastro, ĉu iam petis ke vi ĝin faru ?

FIL. — Ne ; sed li konsentis ke mi ĝin faru.

GUAS. — Diru prefere ke vi ne lin komprenis.

FIL. — Finfine : ili min perfidis, ili min trompis. Mia filino estas perfidulino. La leŭtenanto estas krimulo.

GUAS. — Parolu pli bone pri oficiro.

MAR. — Atentu zorge ke la militistoj kutimiĝis teni la spadon en mano.

FIL. — Ho, ĝi estus bele, ke kiel aldono li min mortigus.

GUAS. — Mia mastro ne havas tiajn barbarajn sentojn. Li venos preĝpeti de vi pardonon.

FIL. — Mi ne volas lin vidi.

GUAS. — Venos anstataŭ li via filino.

FIL. — Ne plu ŝin nomu ĉe mi.

MAR. — Via sango, sinjoro.

FIL. — Sendanka! Ŝi estis mia amo, mia nura kontento.

GUAS. — La farito ne havas rimedon.

FIL. — Mi ĝin scias, insolenta, mi ĝin scias bedaŭrinde.

GUAS. — Ne koleru kun mi.

MAR. — Lin kompatu. La pasio lin premegeas. Mia kompatinda mastro, li esperis edzinigi laŭ sia plaĉo la filinon, havi ŝin ĉiam proksima, kaj vidi naskiĝi nepetojn, kaj ĝoji ilin ĉirkaŭprenante, ilin vartante li mem.

FIL. — Miaj perditaj esperoj! Miaj perditaj konsoloj!

GUAS. — Ĉu vi opinias, sinjoro, ke bofilo, bona Franco kaj bona militisto, ne kapablos havigi al vi nepetojn?

MAR. — Ne pasos jaro, kaj vi vidos ĉirkaŭ vi petoli la plej belan knabeton el la mondo.

FIL. — La malamo al la patro igus min malami ankaŭ la filon.

MAR. — He, la sango, sinjoro, forgesigas ĉian ofendon.

GUAS. — Vi havas ja nur unu filinon en la mondo, kaj vi havos koron ŝin forlasi, por ŝin vidi neniam plu?

FIL. — Mi havas en la animo tian ĉagrenon, ke mi min sentas mortanta (*li kovras sian vizaĝon per manoj*).

MAR. — Guascogna?

GUAS. — Kion vi diras?

MAR. — (*ŝi gestas al li ke li foriru*) Ĉu vi min komprenis?

GUAS. — Mi komprenis.

MAR. — Nun estas tempo.

GUAS. — Oni povas provi.

FIL. — Kion vi diras?

MAR. — Mi diras al Guascogna ke li foriru, ke li ne vin malkvietigu plu, kaj ke li ne trouzu vian bonecon.

FIL. — Jes, lasu min sola.

GUAS. — Mi vin respekte salutas, sinjoro. Se mi ne plu devos vin revidi, bonvolu pardoni se en via hejmo mi hazarde iam maltaŭge kondukis. Mia mastro, laŭ mi vidas, estos devigata foriri, kaj kondukos en Francujon la edzinon. — Ĉu vi nenion diras al mi, por rediri al via kompatinda filino?

FIL. — (*al Guascogna*) Ĉu vi opinias ke li volos foriri tiel frue?

GUAS. — Li min diris ke se mi ne ricevos ian bonan respon-
don, mi senprokraste iru mendi la ĉevalojn.

MAR. — Granda doloro por patro, diri: neniam mi vidos plu mian filinon!

FIL. — Ĉu vi vidas ke via mastro estas barbaro, estas sen-
danka fierulo? Ĉu mi povis fari por li pli ol tiom, kiom mi
faris? Sed li, ĉu povus agi al mi pli barbare? Ol ŝiri el mia
koro la filinon, sen ke mi povu ŝin eĉ revidi?

GUAS. — Mi opinias ke li ŝin kondukus antaŭ vin tre volonte,
se li ne timus vian indignon.

FIL. — Perfida! Ĉu mi devas lin laŭdi pri tiu bela ago? Ĉu
mi devas lin danki pro lia trompo? Li evitas la riproĉojn de patro
ofendita? Lin ekbrulas ke li devus aŭdi sin nomi perfida?

GUAS. — (*ekforirante*) Mi komprenis. Laŭ permeso.

FIL. — Vi ne diru iam al ili ke ili venu ĉe min. Mi ilin ne
volas, mi ilin ne deziras.

GUAS. — Mi komprenis tre bone. (La naturo ne povas misfari.)
(*li foriras*).

SCENO KVARA

(*SINJORO FILIBERTO kaj Marianna*).

MAR. — (La kazo alproksimiĝas al ordiĝo.)

FIL. — (Mia puno! Mi ĝin meritas. Mia puno!)

MAR. — Sinjoro, por vin amuzi iomete, ĉu mi povas nun
paroli al vi pri miaj aferoj?

FIL. — Mankus nur tio, por min malkvietigi, ke vi parolus al
mi pri via geedziĝo. Mi malamas ĉi tiun nomon fatalan, nek mi
volos plu aŭdi pri ĝi paroli, ĝis mi vivos.

MAR. — Vi volus, laŭ mi aŭdas, ke finiĝu la mondo?

FIL. — Por mi ĝi finiĝis.

MAR. — Kompatinda mastro! Al kiu iros viaj havaĵoj, viaj
riĉaĵoj?

FIL. — La diablo ilin prenu!

MAR. — Vi mortos riĉa, kaj via filino vivados mizera.



GIA. — ... Urĝe kaj flustre ke neniuj ĝin konu!

(Akto tria - Sceno lasta)

FIL. — Kompatinda malfeliĉulino!

MAR. — Kaj vi volos vivadi kun tia malamo, kaj morti kun tia interna riproĉo?

FIL. — Sed silentu, demono, silentu. Ne min turmentu plie.

SCENO KVINA

(*FRAŬLINO COSTANZA kaj diritaj*).

COS. — Sinjoro Filiberto, ĉu vi mokludas per mi?

FIL. — (Nun mankis nur ĉi tiu.)

COS. — De du horoj mi atendas, kaj oni vidas aperi nenium.

FIL. — (Mi ne scias kion respondi.)

COS. — Ĉu vi ne min instigis reveni ĉe la onklinon, dirante ke tien iros la sinjor' leŭtenanto?

MAR. — Mi vin diros, sinjorino, kiel estis la afero. Sinjoro leŭtenanto devis iri ĉe la onklinon, kaj ĉe la onklinon li iris; li devis interkonsenti kun fraŭlino, kaj kun fraŭlino li interkonsentis. Sed la kompatinda ĝentilhomo eraris pri la domo. Anstataŭ eniri ĉe onklinon Ortensia, li troviĝis ĉe onklino Geltrude, kaj anstataŭ edziĝi kun fraŭlino Costanza, li edziĝis kun fraŭlino Giannina.

COS. — Kiel! ĉu estus iam eble ke mi estas mokata tiagrade? Parolu vi, sinjoro Filiberto; min klarigu pri ĉi tiu fakto, kaj ne kredu min tiom malbrava por toleri ofendaĵon.

FIL. — Ho, korpo de l'diablo! se mi ĝin toleras, devos ĝin toleri ankaŭ vi.

COS. — Kaj kion vi devas toleri?

FIL. — Pro vi, mi mem kontribuis al ruinigo de mia filino.

COS. — Pro mi?

FIL. — Jes, pro vi stariĝis maŝino, kiu poste disfalegis sur miajn ŝultrojn.

MAR. — Bonŝance ke havas bonan dorson la mastro.

COS. — Mi komprenas nenion.

FIL. — Mi diros al vi simple kaj klare la aferon. Sciu do...

SCENO SESA

(*SINJORO RICCARDO kaj diritaj*).

RIC. — (*al Costanza*) Kion vi faras ĉi tie?

FIL. — (Jen la resto.)

COS. — Sinjoro, vi neniam malpermesis al mi viziti ĉi tiun hejmon.

RIC. — Mi komencas nun tion al vi malpermesi. Mi scias kial vi ĉi tien venas; mi scias vian amindumadon kun la fremdulo, kaj scias ke ĉi tie oni insidas vian moron kaj mian aŭtoritaton.

FIL. — (*al Riccardo kolere*) Vi scias nenion, kaj se vi sciis kion mi scias, vi ne parolus tiele.

RIC. — Mi bazas mian decidon sur tio kion vi al mi diris, kio ne estas malmulto, kaj sufiĉas por devigi mian filinon ne veni plu en ĉi tiun domon.

MAR. — Ĉu vi timas ke oni ŝin edzinigus spite vin?

RIC. — Mi povas eĉ timi ĉi tion.

MAR. — Aŭdu. Se ŝi ne edziniĝas kun la mastro, ĉi tie estas neniu alia.

RIC. — Kie estas la Franco? Kie estas la oficiro?

MAR. — (*al Filiberto*) Sinjoro, ĉu vi permesas ke mi ĝin diru?

FIL. — Ha! bedaŭrinde oni ja ĝin ekscios.

MAR. — Sinjoro, vi sciu do ke la sinjor' oficiro brave edziĝis kun mia mastrino.

RIC. — (*kun miro*) He!

FIL. — (*kun kolero*) Ho!

COS. — Jen la insultaĵo kiun mi timis. Ha! sinjor'patro, venĝu la insulton kiun mi ricevas. Ili min uzis por maski ilian amon; ili min flatis por min mokadi, kaj la ofendo al mi farita iĝas ofendo por nia familio.

RIC. — Jes, mi venĝos la ofendon al mi faritan. Vi estos ŝlosata inter kvar muroj, kaj sinjoro Filiberto pagos al mi la insulton per la honto pri si mem.

FIL. — (Mi tion meritas. Mi meritas pli multon.)

COS. — (Mi malfeliĉa! Al kia situacio min kondukis pasio, malforteco kaj malobeemo!)

FIL. — Kara amiko, pardonu al mi mian flamiĝon. Nun mi konas la maljustaĵon kiun mi al vi faris, kaj juste la ĉielo min punas pro mia malbona intenco. Ha! sinjoro Riccardo, mi perdis mian filinon, kaj mi mem havigis al mi la malfeliĉon.

RIC. — Ĉu perdita? Se ŝi edziniĝis, ŝi ne estas plene perdita.

FIL. — Mi dubas ke mi ne ŝin vidos iam plu. Kiu scias, eble nun tiu hundo ŝin kondukos malproksimen? Mi mem donis al li kvincent gineojn por forporti mian koron. Mian filinon, mian

solan filinon, mian amon, mian solan pasion. Ha! ke mi povu ŝin ĉirkaŭpreni unu fojon almenaŭ. Mi volas scii ĉu ŝi foriris, mi volas klopodi ŝin vidi. Se ŝi foriris, mi volas min mortigi per miaj propraj manoj (*elirante, li renkontiĝas kun la filino*).

SCENO LASTA

(*FRAŬLINO GIANNINA kaj diritaj, poste SINJORO DE LA COTERIE kaj GUASCOGNA*).

GIA. — Ha, kara patro!

FIL. — Ha, sendankega filino!

GIA. — (*ŝi surgenuiĝas*) Pardonu min pro kompatato.

FIL. — Vi ne meritas pardonon.

GIA. — Estas justega via kolero.

FIL. — (Mi min sentas mortanta.)

RIC. — (La kazo estas kompatinda pri ambaŭ.)

COS. — (Mi estus venĝita se la patro ne pardonus al ŝi.)

FIL. — Leviĝu.

GIA. — Mi ne leviĝos sen via pardono.

FIL. — Kaj vi havis koron kaŭzi al mi tiom grandan doloron?

GIA. — Ha, sinjoro, via konsilo...

FIL. — Silentu, ne min turmentu pli daŭre. Ne parolu plu al mi pri mia senkonsideraĵo, pri mia malfortaĵo. — Leviĝu, sub tiu ĉi kondiĉo mi vin pardonas.

GIA. — (*ŝi leviĝas*) Ho, plej amema patro!

COS. — (Kostas malmulte al ŝi la pentato.)

GIA. — Ha, sinjoro, estu via favoro kompleta...

FIL. — Ne parolu al mi pri via edzo.

GIA. — Aŭ vi lin akceptos en vian koron, aŭ mi estos devigata vin forlasi.

FIL. — Perfida! Tiel vi parolas al via patro?

GIA. — La geedza fidelo min devigas al tia eksceso.

FIL. — (Ho, senkompata puno por patro! Sed mi ĝin meritas, mi meritas pli multon.)

RIC. — Amiko, la afero estas farita, ne ekzistas rimedo. Mi konsilas al vi rezignacian akcepton antaŭ la diskoniĝo tra la urbo de la kurioza okazaĵo de vi travivita.

FIL. — Mi min rekomendas al vi, mi min rekomendas al

fraŭlino ke oni ĝin ne konu, pro mia honoro, pro mia estima-
teco. — (*al Marianna*) Atentu vi, ne parolu. — (*al Giannina*) Filino
mia, ne parolu pri ĝi al iu ajn.

GIA. — Ne, pro amo al ĉielo, ke oni ĝin ne konu. Urĝe ni
ordigu ĉiun aferon, antaŭ ĝia forflugo el ĉi tiuj muroj. Urĝe, kara
edzo, venu antaŭen, ĵetu vin ĉe piedojn de mia kara patro, petu
de li pardonon, kisu lian manon. Li vin pardonas, vin akceptas
kiel bofilon kaj filon. Urĝe kaj flustre, ke neniu ĝin konu (*ŝi
plenumigas perforte ĉiujn aferojn diritajn*).

FIL. — (Mi senkonsciiĝis, mi ne scias kion mi faras.)

COS. — Mi ne kuraĝas elteni la vidon al tiu sendanka per-
fidulo (*ŝi foriras*).

COT. — (*al Filiberto*) Sinjoro, ĉu vi min pardonis?

FIL. — Ĉu ŝajnas al vi meriti mian pardonon?

GIA. — Pro amo al ĉielo, ni ne parolu plu. Zorgu ke neniu
eksciu tion kio okazis. Tre deziras mia patro savi la konvenecon
de la familio, kaj precipe mi vin avertas, neniam memorigu por via
senkulpigo ke li mem vin konsilis al tia faro, kaj ke donis al vi
kvinent gineojn por la plenumo.

FIL. — (*al Giannina kolere*) Mi ordonis al vi ne paroli
pri tio.

GIA. — Mi nur komunikis al mia edzo vian ordonon.

RIC. — Nu, sinjoro Filiberto, ĉu vi paciĝis?

FIL. — Kion vi volas ke mi faru? Mi estas devigata de la
neceso, de la amo, de mia naiveco, al paciĝo. Mi ne scias kion
diri. Vi estas geedzoj, vi estas en hejmo: ĉi tie restu, kaj la
ĉielo vin benu.

GIA. — Ho, ĝojo perfekta!

COT. — Sinjoro, mi esperas ke vi ne devos penti tial ke vi
min pardonis kaj bonfaris.

MAR. — Flustre kaj urĝe, ke neniu ĝin konu.

FIL. — Kion vi havas nun?

MAR. — Estas alia malgranda afero, urĝe kaj flustre, finota:
Guascogna devas esti mia edzo. Kun permeso de viaj moŝtoj.

GUAS. — Kun permeso de miam astro (*ili donas al si reci-
proke la manon*).

MAR. — Flustre kaj urĝe, ke neniu ĝin konu.

GIA. — Pri ĉi tiu via edziniĝo nenio estas por diri. Pri la mia
oni povus kritiki, kaj mi mem konfesas, ke mi preterpasis la
limojn de l' devo, mankante je la ŝuldata respekto al la patro,

kaj endanĝerigante mian bonan moron kaj la bonan famon de la familio. La mondo, kiu nun min vidas kontenta, kaj ne punita, gardu sin de la malbona ekzemplo. Ĝi diru prefere ke la ĉielo volis humiligi la patron kaj ne liberigas je konscienciproĉoj kaj je timo la filinon. Tre humanaj aŭskultantoj, estu rezulto de ĉi tiu spektaklo la singardemo en la familioj, kaj estu frukto de via boneco viaj tre humanaj akcepto kaj ŝato.

KURTENO

FINO DE LA KOMEDIO

NOTOJ PRI KELKAJ VORTOJ AŬ ESPRIMOJ

- * **Uzino**: metia laborejo, industria maŝinlaborejo.
- * **Mimo**: praroma mimikisto, histriono.
- Masko**: tipa teatra maskulo.
- Adriatika**: de Adriatika maro.
- Komika**: *komedia 1*.
- Menandros**: pragreka teatristo.
- Venecia**: de urbo Venezia.
- Sugesto**: *sugestio 2*. - Dum *sugestii* esence rilatas al hipnotigo, *sugesti* montras simple *doni ideon, proponi decidon*.
- He**: voka interjekcio; interjekcio kun signifo *ĉu ne?! , nu!* aŭ simile.
- Junino**: anstataŭ *junulino*; v. Plenan Vortaron.
- * **Hej**: voka interjekcio.
- Subelspezoj**: sekretaj elspezoj por nehonestaj celoj: komparu kun *subaĉefi*.
- * **Gineo**: monero valoranta 21 anglajn ŝilingojn.

La vortoj signitaj per steleto ne estas en la Plena Vortaro.

Tre valoran helpon por la bona sukceso de la traduko de ĉi tiu verko bonvolis doni S.ro Stefano La Colla L.K. per tra- legado de la presprovoj kaj valoraj lingvaj konsiloj, kaj Fraŭ- lino Paola Mellina per tra legado de la presprovoj.

Ĉe "Esperanto-Centro Itala",
Galleria Vitt. Eman. 92 - MILANO

Prezzo Sv. fr. 1,50

Prezzo lire 5